



la informilo

ISSN: 0291-6037

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

ESPERANTO~FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F


PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série

trimestriel

4^e-trim. 1982

n° 40



abonnement

un an: 18 F

UNU JARO: 18 F

(8 INTERN. KUPON.)

ANTO-FLASH... ESPERANTO-FLASH... ESPERANTO

Le stage international d'ESPERANTO: une formule qui plaît !

La MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Philippe Desforges à NANCY a connu au cours du week-end 6/7 novembre 1982 une animation inaccoutumée. Plus de 80 participants (Français, Allemands, Belges... et Anglais!) se sont en effet retrouvés pour pratiquer en commun la Langue Internationale. Dans une ambiance extrêmement sympathique, jeunes et adultes ont suivi 4 cours de degrés différents afin de mieux maîtriser cet outil irremplaçable de l'intercommunication ... qu'est l'espéranto.

Le samedi soir, un spectacle de variétés où se sont heureusement mêlés poésie, chant et théâtre, a permis aux stagiaires d'apprécier les mille et une facettes -et facéties!- du trio parisien Jak, Armela et Georges du cabaret "La Ruza Kruĉo" ("La Cruche Rusée"). Le service de librairie qui a fonctionné en permanence a fourni à chacun livres, disques, cassettes. Quelques stagiaires se sont fait plaisir en se soumettant aux épreuves d'examen du dimanche matin. Le prochain stage aura lieu à METZ en juin.

menu ★

1er degré

"METODO 10"

2^{eme} degré

"Tinĉjo

3^{eme} degré

Atesto pri Kapableco

4^{eme} degré

"krabo..."

Vivo de ZAMENHOFF



L'ESPERANTO ET LES PREMIERES ASSISES MONDIALES DE LA PAIX ★

A l'initiative du Maire de VERDUN, les premières Assises Mondiales de la Paix se sont tenues dans cette cité les 15, 16 et 17 octobre. Les représentants de nombreuses villes-martyres ont jeté les bases concrètes d'une recherche systématique des moyens à mettre en oeuvre pour éliminer les facteurs de guerre. Le Groupe des Espérantistes Meusiens et la fraction pacifiste de SAT ont apporté leur concours par une exposition très remarquée et une participation active aux

débats, au côté d'une trentaine d'associations nationales ou internationales oeuvrant dans la même direction. Parmi les nombreuses résolutions adoptées on notera le souhait d'utiliser l'espéranto en vue de faciliter les échanges futurs entre les villes concernées.

LES RADIOS LIBRES ET L'ESPERANTO

L'ostracisme déconcertant des grands émetteurs nationaux à l'égard de la Langue Internationale est heureusement compensé par l'intérêt grandissant des nouvelles Radios Libres qui multiplient leurs émissions sur la L.I., parfois de façon régulière. C'est ainsi que RADIO-GRAOULLY-METZ (RGM 101 MHz) -70 animateurs... émissions permanentes de 9h à 2h30 du matin!- a inséré dans sa grille de programme une chronique hebdomadaire (le lundi de 14h à 15h) pour mieux faire connaître l'Espéranto à ses auditeurs. L'indicatif bien connu "Si tous les gars du monde..." chanté par les Compagnons, ouvre cette émission spécialisée gérée par "Marthe", responsable par ailleurs du GEMME -Groupe Espéranto de Montigny, Metz et Environs- Des interviewes en direct ont été diffusées au cours du stage international de NANCY. Bravo à "Radio-Graouilly" pour sa collaboration désintéressée... et meilleurs encouragements à Marthe pour sa disponibilité souriante!



L'UN DES PLUS GRANDS MUSEES D'ESPERANTO D'ESPERANTO... SE TROUVE EN FRANCE!

La notoriété du MUSEE NATIONAL D'ESPERANTO de GRAY (70-Haute/Saône) dépasse en effet largement les frontières. Cinq années après sa création, ce véritable Centre National de la Linguistique en général et de l'Espéranto en particulier, est une véritable source de découvertes et d'étonnement pour le profane. Outre la bibliothèque, véritable fleuron de la culture internationale où se côtoient des centaines d'oeuvres originales et de traduction, on découvre la collection inestimable de toutes les revues éditées en espéranto, la filmothèque...la magnétothèque, la discothèque qui s'enrichissent au fil des jours... et une prolifération de documents dont la rareté le dispute à l'originalité: l'affiche du 1er Congrès Universel de BOULOGNE en 1905, les communiqués de guerre allemands rédigés en espéranto lors du premier conflit mondial, une collection de cartes de visite de personnalités ayant pratiqué ou pratiquant l'espéranto, une imposante série de dictionnaires en 25 langues, une centaines de manuels d'étude... Selon la formule consacrée: "Un musée qui vaut le détour!"



SEMAINE TOURISTIQUE INTERNATIONALE SUR LA COTE D'AZUR

Sous l'égide de l'Union Française pour l'Espéranto, une semaine touristique internationale est organisée du 25 juin au 2 juillet. Le programme offert aux participants s'annonce particulièrement attrayant. Visite des sites les plus prestigieux de la Côte et de l'arrière-pays, promenade en mer, excursion en Italie, soit en tout 600 km en autobus confortable et séjour en hôtel de qualité, sans omettre le contact permanent avec l'Espéranto! Tous renseignements et fiche d'inscription à l'adresse suivante:



|| INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO _____

|| "Les hortensias 2" Domaine des Fleurs,
|| 121 bis, Bd Napoléon III - F-06200 NICE

★ L'ESPERANTO ET LE GAZ SIBERIEN

Le contrat soviéto-européen pour la livraison du gaz naturel sibérien offre la possibilité d'introduire de façon concrète la Langue Internationale dans le domaine des activités économiques; tel est le point de vue exprimé M. Mohamed ICAJEW, représentant l'Association Mondiale Espérantiste, dans un article publié par le journal soviétique "KOM-SOMOL". Selon M. Icajew, le nombre des Etats impliqués dans les négociations liées à l'établissement du contrat est tel et les problèmes soulevés si complexes, qu'une langue internationale s'avère nécessaire pour mener à bien la réalisation de cette gigantesque netreprise.

★ LES PROCHAINS CONGRES UNIVERSELS

Grèce, Islande, Bulgarie, Suisse, Suède, Brésil... et Belgique! C'est Budapest qui accueillera après ANVERS le 68ème Congrès Universel d'Espéranto, du 30 juillet au 6 août 1983. En 1984, la ville de VANCOUVER (Canada) organisera à son tour ces assises mondiales, du 21 au 28 juillet (le dernier C.U. sur le continent américain s'est tenu à BRASILIA en 1981).

Puis retour en Europe en 1985, du 3 au 10 août à AUGSBOURG (République Fédérale Allemande). Les villes suivantes se sont portées candidates pour les Congrès de 1986, 1987 et 1988: PEKIN, VARSOVIE, et une cité d'Australie à définir. Le Congrès Jubilaire de 1987 revêtera un caractère véritablement exceptionnel... puisqu'on y fêtera la centième année d'existence de l'Espéranto dont l'universalité est aujourd' hui totale comme le montre la liste précédente.



★ DE NOUVELLES RUES "ESPERANTO"

Une artère de Pollena Trocchia (près de Naples) porte désormais le nom de "Via ESPERANTO". Son inauguration a eu lieu au cours de la 16ème conférence de la LIGUE INTERNATIONALE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES.

Hors-la-loi durant de nombreuses années au Portugal, l'Espéranto a vite retrouvé sa vitalité originelle. Une place "Dr ZAMENHOF" se trouve désormais dans la ville de Barreiro (à proximité de Lisbonne). La plaque a été dévoilée en présence d'une centaine d'espérantophones parmi lesquels le journaliste polonais Lech Kosienak de Varsovie.

NOTRE RUBRIQUE PERMANENTE: *L'ESPERANTO AU SERVICE DE LA CULTURE*

Il serait présomptueux de vouloir recenser les nombreux ouvrages et les publications parues au cours du trimestre. Leur abondance atteste, au grand dam des derniers contemporains de l'espéranto, de son rôle éminemment culturel.

Nous citerons en particulier des lexiques spécifiques:

- = *Un lexique allemand-espéranto sur les problèmes de muséologie.*
- = *Un lexique sur la science hydraulique et un autre sur la chimie.*
- des manuels touchant à l'étude de la langue:
- = *"E° snell assimilieren" (à destination des Flamands);*
- = *"Syntaxe et vocabulaire en E°" (à destination des Chinois).*
- = *Réédition des dictionnaires de poche Alld/E° et E°/Alld (Leipzig).*
- = *Un manuel synthétique à destination des Bengalais.*
- = *Un dictionnaire E°/Malgache.*

- des ouvrages divers:

- = *La communication avec les mal-entendants.* (Anvers)
- = *Vie et oeuvre du grand peintre vénitien Le Titien* (Portugal).
- = *Le microprocesseur INTEL 8080* (traduit de l'anglais).
- = *Les étudiants et l'E° - Tito et l'E°* (Yougoslavie).

-... à vocation littéraire:

- = *Science fiction et fantastique - 9 récits* (Espagne)
- = *Le sentimental* (F. Cooper)
- = *Nouvelles originales - E. Toth* (Hongrie)

-... .. ou musicale:

- = 2 cassettes stéréo: "*Petite fleur*" (du guitariste et ténor Feri Floro).
- "*Israël chante*" (Chantal)

Un nouveau disque de Veselin Danjanov, accompagné par Agathe Soemer-Pascali:
Extraits de "*La flûte enchantée*", le "*Mariage de Figaro*",
"*La Barbier de Séville*".

Dans la série des opinions autorisées (suite):

Amadou-Mahtar M'BOW, Directeur Général de l'UNESCO:

"Avec une persistance digne d'éloges, vous êtes devenus les pionniers de la compréhension internationale qui fraie les voies nouvelles au dialogue entre les peuples et les cultures".

Willem DREES, ex-premier ministre des Pays-Bas: (espérantophone!)

"Nous devons enfin avoir une langue commune pour l'utilisation internationale, et aussi séduisante que puisse paraître l'idée de choisir pour cette langue internationale l'une de celles qui sont déjà parlées par des centaines de millions d'hommes, je suis malgré tout convaincu qu'une langue neutre comme l'espéranto -- devant laquelle tous les hommes se trouvent égaux en droit -- est préférable".



Toute personne désireuse d'apprendre l'espéranto
(ou de se perfectionner) par correspondance peut s'adresser au
centre spécialisé de notre Fédération:

ACTIVITE ESPERANTO
MJC Philippe Desforges
27, rue de la République, 54000 NANCY

Ces cours (2 degrés différents) fonctionnent en permanence.

A vous comme à nous tous il est arrivé d'entendre cet argument qui est d'autant plus exécrable qu'il démontre plutôt l'hypocrisie de son auteur que l'incapacité de la langue internationale.

En général, quelques explications accompagnent ce propos:..."*Voyez le latin... et l'anglais!!! mais l'espéranto...*"

Eh bien!... Si nous comparons ces trois langues et l'hospitalité qui leur est accordée dans l'Enseignement, que voyons-nous?

Le latin, enseigné en Gaule dès l'arrivée de l'administration romaine, a commencé à décliner dès 1539 avec l'Edit de Villers-Cotteret qui prescrivait le remplacement de cette langue par le français. Mais actuellement, surtout après les échecs du latin devant le Concile "Vatican II", il s'agit bien maintenant d'une langue définitivement morte!

L'anglais?... Oh, certes, il est prospère et tous les ans plusieurs centaines de millions de francs sont consacrés à son enseignement sous forme de laboratoires de langues, lecteurs et professeurs, séjours à l'étranger, que sais-je encore? Et malgré cela le pourcentage de ceux qui parviennent à le parler couramment ne dépasse guère 5 à 6%!

Et l'espéranto? Lui, par contre, ne bénéficie d'aucun droit et reste sévèrement banni de nos lycées et collèges*; malgré tout, il vit et s'étend, sa littérature augmente et le nombre de ses pratiquants s'accroît.

Ne pensez-vous pas que de tout cela se dégage une hypocrisie qui révolterait si elle ne portait en elle un vibrant hommage à l'espéranto? On veut en effet comparer des langues dont le statut est totalement différent; en plus ce sont souvent les ennemis les plus acharnés de la langue internationale qui viennent objecter son insuccès.

Mais on peut se demander pourquoi "ils" combattent l'espéranto; ne serait-il pas plus juste, plus démocratique, de mettre à égalité les trois langues précitées? Les parents, les jeunes, le peuple enfin choisiraient. La vérité c'est qu'ils savent la perfection et les capacités de l'espéranto et c'est de cela qu'ils ont peur. C'est un succès qu'on redoute dans les sphères officielles et qu'il faut retarder à tout prix!

Oui, mais tout n'a qu'un temps et le succès viendra pour la langue de Zamenhof comme il est venu pour le système métrique.

A. RIBOT

* La position la plus récente du Ministre de l'Education Nationale, A. SAVARY (signataire du projet de loi sur l'enseignement optionnel de l'espéranto sous la précédente législature!!!) est contenue dans la lettre suivante, adressée à Monsieur CARTELET, député de l'Aube:

Ministère de l'Education

Paris le 13 MAI 1982

Le Ministre

CAB/BDC/CP 3894 F

Monsieur le Député,

L'introduction de l'espéranto dans les programmes et horaires d'enseignement n'est pas envisagée actuellement. Mon objectif est de permettre aux élèves, par l'étude des langues régionales ou étrangères, l'accès aux cultures régionales françaises ou aux différentes civilisations. L'espéranto, langue créée pour la seule communication, ne correspond pas à ce souci. En revanche, une initiation peut néanmoins être proposée aux élèves dans le cadre des activités socio-éducatives, l'amélioration des outils de communication entre les hommes étant une des nécessités de notre temps.

Veuillez agréer, Monsieur le Député, l'expression de mes sentiments les meilleurs,

Alain SAVARY

agadraporto

La agadraporto komenciĝu -ĉu nun tradicie?- per ciferoj (interkrampe la ciferoj de la lasta jaro):

Individuaj membroj de la Federacio:	167	(177)
Membroj de UFE	: 94	(79)
Membroj de UEA	: 43	(41)
Membroj de JFEO	: 8	(8)
Membroj de TEJO	: 0	(3)
Membroj de GEE (instruistoj)	: 22	(ne notitaj)
Abonoj al LA INFORMILO	: 266	(270)

Koresponda Kurso (Komencantoj) : 45 (50)

Staĝanoj -somera en METZ- : 55 (50)

-vintra en NANCY- : 83 (90)

Parolaj kursoj okazas en 6 urboj : (6)

METZ (3 kursoj!), PONT-SAINT-VINCENT, STRASBOURG, SELESTAT, MUNSTER, NANCY (3 kursoj).

Grupoj agadas en NANCY, METZ (2 grupoj), STRASBOURG kaj BAR-le-DUC.

En la agado realiĝis la jenaj punktoj:

- = eldono de cirkulero kaj informfolio pri la Internacia Lingvo kaj la Perkoresponda Kurso de NANCY (stoketo da ili estas sendita al ĉiuj korektantoj de la P.K^o, delegitoj en la telefon-libro kaj sur la cirkulero al la Akademi-Inspektoroj.)
- = ĉeaktualigo de la ekspozici-materialo de la Federacio (disponebla ek de januaro 83).
- = reklamo-kampanjo ĉe la studentoj pri "PASPORT-SERVO", pri la Perkoresponda Kurso kaj pri "METODO 4".
- = daŭra sukcesa organizado de staĝoj en NANCY kaj METZ.
- = internacia karnavalo en BAR-le-DUC.
- = sukcesa kongreso en MULHOUSE kun sesdeko da partoprenantoj.
- = sendo de 73 anoncoj al regionaj gazetoj; 43 aperoj povis esti kontrolitaj.
- = intervjuoj ĉe Libera Radio en METZ (S-r^o DE ZILAH) kaj eĉ konstanta semajna rubriko pri ESPERANTO (S-in^o NAU). Intervjuoj ankaŭ okazis dum la staĝo en NANCY.

Kion dedukti el tiuj ciferoj? Konstateblas, ke grava laboro estas farita de la aktiviloj. Kreskis la aliĝoj al U.F.E. -kio montras, ke la laboro de la nacia asocio iĝas fruktodona-. Tamen ne kreskis la nombro de la Federacionoj kaj de la lernantoj de la P. K^o. Kial? Tutsimple mankas ĉenero en la informado de la publiko: unuafoja, mallonga informo en amas-komunikiloj ankoraŭ ne sufiĉas, esperanto ne estas sufiĉe konata. Ĝi bezonas aliflankan, kompletigan -sed tamen nemalhaveblan- rektan alparolon de la informotaj personoj. Kaj tio estas la tasko de ĉiu samideano!

Ĉu vi memoras la instigan lastan frazon de la pasintjara raporto: ĉiu provu aliĝigi almenaŭ unu personon al la perkoresponda kurso aŭ al la Federacio. Tiun konkretan rezulton de via agado vi protokolu mem per propra raporto.

La sekretario:

E. Ludwig

NEKROLOGO

Nia komuna amiko Joseph KRAEMER (68-Guebwiller) forpasis la 16an de oktobro 1982. Ni ĉiuj memoras lian sindonemon, lian humuron kaj lian fidelecon al niaj kulturaj aranĝoj, ĉu staĝaj, ĉu kongresaj. Li donacis sian E^o-Librokolekton al la federacio. Ni renovigas al lia familiano niajn sincerajn kaj tutkorajn kondolencojn.

La famille de

Monsieur Joseph KRAEMER

voudrait pouvoir dire à chacun personnellement le bien que lui a fait chaque témoignage de sympathie et d'affection exprimé par un message, une présence, une main tendue, un regard.

Elle est dans l'impossibilité de le faire, mais vous prie de trouver ici la reconnaissance qui est dans son cœur.

Guebwiller, octobre 1982.


Sinjoro Raymond SCHEFFER, patro de nia aktivulo YvesSCHEFFER, mortis en METZ la 2an de oktobro. Al Yves, al lia patrino kaj al lia patrino ni sincere kaj tutkore kondolencas.

MIA UNUA UNIVERSALA KONGRESO: LA 67A!


En mia dosiero kongresa mi trovis notkajereton sub fatraso de pli-malpli utilaj paperaĵoj. Ĉar la kajereto estas bonaspekta mi tuj ekdecidis uzi ĝin por priskribi miajn impresojn de freŝbakitulo pri la Verda Foiro. Eble la federacia kasisto akceptus ke INFORMILO pagus al mi honorarion por la publikigo de miaj travivaĵoj, ĉar mi konfesas ke pro 6 taga ĉeesto, dum unu monato mi nur manĝis terpomojn kaj eĉ forgesis ke vino ekzistas. Tio estas la unua grava, neforgesebla aspekto de Universala Kongreso: la kosto, digne proporcia al la alta valoro de la nur tie aŭdeblaj diskursfluoj. Prijuĝu mem: aliĝkotizoj 650 FF (por paro laŭleĝe geedzigitaj tamen), studenthotelo 700 FF (por la samaj kunmetituloj), bankedo FF 300 (por ambaŭ), benzino FF 230. Adiciu se vi kuraĝas: mi kuraĝis kaj trovis FF 1880. Kontraŭ ĉi-tiu sumo ni havas lokon por tranokti kaj dosieron enhavantan la kongresan libron 112 paĝajn kaj ĉi-tiun, jam menciitan, notkajereton. Pri la aldonitaj reklampaperaĵoj ne valorus paroli se ne ekzistus la internacilingva broŝuro "Abunde manĝi etosplene amuziĝi (kaj trinki) en Antverpeno", en kiu vi povas legi, sub rubriko "Seksumado"... "ili finfine alvenas en la romantik-etosa (+n!) ĉambro (+n!) kun la tiel dezirata persono...", kiu montriĝas esti de alia sekso ol oni antaŭvidis. Fakte, kelkaj el la plej belaj virinoj estas viroj... bone kamuflitaj. Sed tiam kompreneble la antaŭa pagita mono jam estas for ..."



Mi ne scias kiaseksaj estis la homoj, kiuj okupis nian ĉambron en "Sleep-Inn" de Placo Bolivar, sed centoj da nigraj haroj -kapharoj aŭ pugharoj, mi ne tro povas aserti ĉar la korpoformoj sur la littuko ne estis sufiĉe netaj -pruvas ke ili estus afrikanoj. Mi provis daŭrigi la enketon sed min haltigis la perfekta neŭtraleco de la fekaĵo, kiu plenigis la necesajn kuveton, feliĉe, sufiĉe malproksiman de nia ĉambro. Mi devas menci, se mi volas resti fidebla raportanto, ke esperantistoj loĝantaj en la hotelo, post unu tago, tre akurate purigis ĉi-tiun necesojn, kiu estiĝis uzebla poste, se ne mankis papero.



Sed, vi diras, ĉi-tiuj malgravaj flankoj de la afero ne interesas vin. Ankaŭ ne ke la matenmanĝo estis preta nur je la naŭa, do ni ĉiuj, en ĉi-tiu hotelo, preteratentis programerojn kongresajn inter la naŭa kaj la deka. Mi bedaŭris kelkajn el ili, ekzemple la prelegon de T. Sekelj pri Muzeologio, aŭ la "kongresan temon", sed mi konfidis pri la organizantoj: se ili metis la kongresan temon tiel frue en la mateno, estis ĉar ili trovis ĝin seninteresa, do mi elektis la matenmanĝon kaj ne povas raportti al vi pri kio temis en ĉi-tiu kongreso. Cetere, ĉu vere pasiigis vin ke mi parolas pri "Generaciaj aspektoj de la Esperanto Movado" ?



Kion do mi faris? Turisman viziton anstataŭ la verda meso? Ho, horore, certe ne! Restis sufiĉe da programeroj eĉ se oni preteratentas la kongresan temon. Povas okazi samtempe deko da alogaj aranĝoj, oni ne povas esti ĉie. Eĉ kiam ununura rendezuejo ekzistas oni ne ĉiam povas tien iri, ĉar tutsimple ne plu ekzistas sid- aŭ starlokoj. Tiel okazis al ni je la "Interkona Vespero". "Interkona Vespero" estis la nomo de iu muzika vespero en salono tro malgranda por eĉ la duono de la ĉeestantoj, kie la ceteruloj (tiuj, kiuj sufiĉe frue alvenis) religie aŭskultis muzikon, sed tute ne interkonatiĝis. Fakte mi interkonatiĝis kun kelkaj personoj en mia hotelo, sur bushaltejo (kie ni dum horo atendis buson arivontan post kelkaj minutoj) kaj dum la balo. Se oni vere volus ke oni interkonatiĝu dum la "Interkona Vespero", estus konsilinde prepari falsajn bushaltejojn antaŭ la kongresejo, kie buso neniam haltas, aŭ komenci per balo.



Dimanĉe en la mateno okazis la "Solena Inaŭguro". Mi konfesas ke mi neniam vidis tiom da esperantistoj en ununura amaso, kaj iom da emocio boris sian vojon de mia stomako al mia gorĝo. Feliĉe tian dubindan sentimentalecon tuj haltigis longa parolado de Ambasadora Moŝto Mustapha Masmoudi. Ĝoju francaj esperantistoj! UEA estas kun vi kaj volis pruvu ke la vera internacia lingvo ne estas la angla sed la franca. La organizantoj certe supozis ke kelkaj usonanoj ne komprenas la francan, do ili disdonigis tradukon en iu artefarita lingvaĉo. Kompreneble mi rifuzis la tradukaĵon kaj preskaŭ ĉion mi komprenis. Mi volus tiel bone paroli la ĉinan aŭ la panĵaban, kiel la ambasadora moŝto eldiris la francan! Kaj kia festo por oreloj! Kompreneble ni estis tre entuziasmitaj kaj ni multege aplaudis. Mi agnoskas, ke ne ekzistas popolo, kiu tiel bone aplaudas ol la verda. Vi diras al ili ekzemple, ke Sinjoro Pugtrueskij lernis kelkajn vortojn internaciajn en sia junaĝo sed, ĉar li neniam uzis esperanton, li ilin tute forgesis... kaj vi vidas ke la verduloj rompas al si la manojn pro aplaŭdo kaj la gorĝon pro ĝojkrioj. Dum la "Solena Inaŭguro" kelkaj ambasadoroj, aŭ 323-aj sekretarioj de ambasadoj alparolis la kongreson. Kompreneble la franca ambasadoro nenion diris, ĉar li preskaŭ ĉion komprenis. Pro la sama kialo, en la posttagmezo, dum la "Malfermo de la Kongreso", kiam ĉiuj naciaj organizaĵoj salutis la kongresanojn, neniu franca delegito salutis. Aŭ eble ne ekzistas unuigiĝo nacia por Esperanto en Francio, ĉar mi rimarkis ke ankaŭ delegito de San Marino kaj de Liĥteŝtejno ne salutis. Tamen la festo belis: japana delegitino en kimono kaj egipta en maljuneco egale bone scipovis la verdan.






Antverpeno estas urbo riĉa kun multe da vidindaĵoj en muzeoj kaj bordeloj. Oni parolas tie la flandran dialekton de la nederlanda kun francoj, la francan kun Esperantistoj kaj la anglan kun la ceteruloj. Multe da enloĝantoj estas eĉ afablaj. Du miloj da verduloj vagadis tra la stratoj kun blua ŝildeto surbruste. Mi ne povis kompreni kial baĝo de esperantisma kongreso estis blua, dume ke la kutima koloro de la movado estas verda, sed mi supozas ke, ĉar la plej grava prelego de la kongreso estis france, ĉar tial ke la blua estas la koloro de francaj pasportoj kaj de sportaŭtomobiloj, do ankaŭ la koloro de 67-a U.K. estis la blua. Ni povis aĉeti por po FF 30 trafikkarton, per kiu ni libere povis uzi ĉiujn tramojn, subtramojn kaj busojn de la urbo, t.e. ĉiujn ege maloftajn veturilojn. Malofteco kompreneble estas afero de komparo, do mi komparas al Parizo, ĉar en Antverpeno mi renkontis kelkajn maniulojn, kiuj kuraĝis kompari ĉi flandran urbeton al Parizo. Nu, vilaĝo ĝi ne estas, sed ankaŭ ne ĉefurbo. Certe ne arturbo kaj el ĝiaj domoj kaj muroj ŝvitas monodora, dika malgajeco. Sed tie ni estis por kongresi, ne por ĝui.

Pra natura inklino ni aĉetis biletojn, po 15 FF, por ĉiuj teatraĵoj, pupaj aŭ homaj. Ni ne bedaŭris ĉi-tiun elekton. Kion mi opinias pri ĉiaj unuopaj spektakloj, mi diris en miaj recenzoj en *Monato*, sed entute ili estis utilaj, interesaj kaj agrablaj. Ofte geaktoroj strebas al vera kvalito, pro tio ili estas tre laŭdindaj, ĉar laŭ la sukceso oni ne povas dispartigi bonan rolitaĵon de malbona, tial ke la verda publiko aplaudas entuziasme ion-ajn.

Fakte miaj opinioj povus misgvidi vin. Se vi legis ĝisfinen ĉi-tiujn kelkajn foliojn de mia tagkajero vi estas sufiĉe kuraĝa por elprovi mem la venontjaron U.K. en Budapeŝto.

Eugène de ZILAH.



SUKCESAJ PRINTEMAJ "S O G E L O - TAGOJ" EN MEBKIRCH

Belega vetero favoris la ĉi-jaran aranĝon de niaj najbaraj amikoj de Sud-Okcidenta Germanio. Alveninte triope el NANCY la vendredon post-tagmeze (14an de majo) post agrabla vojaĝo tra Vogezoj kaj Nigra Arbaro, vizitoj al Freiburgo, Titisee kaj Donaueschingen, ni tuj konstatis, ke ni estis la solaj francoj en la tuta partoprenantaro. Entute aliĝis centoj da personoj, el kiuj tre multaj komencantoj, kio estas ĝojiga konstato. Tamen komen-cantoj emas "krokodili", tio estas bone konata fakto, kaj krom la tre multaj Germanoj, ĉe-estis svisa partoprenantaro, kio ankaŭ scipovis la germanan. Ni estis do la 3 solaj, por kiuj Esperanto estis ja nepre necesa komprenilo!

Vendrede vespere, interese prelegis Stefan MAUL, ĉefredaktoro de *MONATO*, pri la rilatoj kun ĵurnalistoj profesiaj. Sabate matene okazis promenado sur la kamparo, post akcepto en la urbo-domo, posttagmeze ekskurso al la monaĥejo de Beuron. Ni veturis aŭtobuse laŭlonge de Danubo ĝis Sigmaringen, kaj survoje kunprenis la partoprenantajn gejunulojn, kiuj boatveturis sur Danubo jam ekde la mateno. Vespere, TRIKSINI, la "Magiisto kun la Blua Stono", ja majstre prezentis al ni siajn magiaĵojn. Ankaŭ ĉeestis multnombro publiko neesperantista, al kiu la magiisto instruis ekparoli kaj nombri en Esperanto! Bedaŭrinde ĉiuj prezentoj kaj ŝercoj okazis germanlingve... do tion ni ne povis aprezi! Dimanĉe, post kunsido de la gvidantoj de S O G E L O kaj post sankta Meso, la renkontiĝo finiĝis post la tagmanĝo.

Tia partopreno estas certe interesa, ĉar ĝi ebligas multnombrajn kontaktojn kaj ni konatiĝis kun multaj novaj amikoj. Tamen por mia edzino kaj mi ĝi estis okazo renkonti malnovajn konatulojn: kun granda ĝojo ni retrovis Irmtraud BENGSCHE, el Konstanz, kun kiu ni organizis unuan renkontiĝon dum Pasko... 1954!... Do, antaŭ 28 jaroj, ni jam venis 17-ope el Nancy per aŭtobuseto ĝis Boden-lago, kaj neniam poste ni havis okazon denove renkontiĝi! Kaj mi retrovis Hermann Schmid, el Augsburg, (reprezentanto de la estraro de Germana Esperanto-Asocio en la renkontiĝo)...

"Sajnas al mi, ke iam antaŭe vi vizitis Nancy ĉu ne? ... mi demandis al li.

- Jes... kaj en tiu vizito gvidis nin juna helpapotekisto el Nancy.

- Ĉu vere?

- Jes, certe!

- Nu... la juna helpapotekisto estis mi..."

Li rigardadis min kun tre grandaj okuloj kaj lia miro komprenigis al mi, vere elokvente, ke mi ne plu aspektas juna! kaj tuj poste li ekridegis, ridegis... La tuta hotelo tremis pro lia ridego kja ĉiuj ĉeestantoj ankaŭ ridegis, verdire ne sciante kial...

Do, entute tre agrabla renkontiĝo!

Jean-Paul COLNOT


La 20a Kultura Semajnfino en SARLANDO okazis en "Junkerwald" la 25an kaj 26an de septembro 1982. Sed la duono de la partoprenantoj estis alvenintaj tuj la vendredon kaj povis profiti la tre agrablan situon de la konferencejo "Junkerwald". La suno estis ĉe la rendezuo kaj ni povis babili promenantante sub la arboj laŭ la bordo de la lago. La nemulta nombro da partoprenantoj ebligis ilin interkoniĝi kaj simpatii.

Ĉiuj ĉeestis la preleg-serion de Stefan MAUL pri la temo *Enkonduko en la Journalismon*, ĉar ne estis "progresantoj" por la alia kurso. Tio plaĉis al ĉiuj, ĉar tiu temo estis la centro de multaj konversacioj antaŭ la komenco de la kursoj. La unua prelego de S.M. estis prezento de la problemo de la internaciaj informoj, kiuj estas ĉiuj kontrolataj de la U.S.-onaj agentejoj. Dum la dua tago li parolis pri *MONATO* kaj faris kontruan kritikon de la hodiaŭa esperantista gazetararo. Laŭ S.M. la plej grava problemo estas la prezentado ofte vendonuliga. Kun simpla informo pri la teknikaj ebloj eblas plibonigi la prezentadon sen kreskigi la kostojn. La esperantista gazetararo devas esti komparebla kun la naciaj gazetararoj. La prelegoj okazigis demandojn kaj ofte sekvis intereseĝaj debatoj.

Tiu semajnfino estis vere kultura kaj ĉiuj promesis unu al la alia revidi sin je la proksima staĝo.

Denis KURT

**Ĉu vi estas fraŭlino
aŭ sinjorino?...**



Plenigante la aliĝilon por la staĝo en Metz, mi havis la surprizon konstati, ke la esperantistaro ne dividiĝas en du, sed en tri seksoj: la sinjoroj, la sinjorinoj kaj la fraŭlinoj.

La plimulto de la esperantistoj kredas, ke "fraŭlino" estas ĝentila vorto. Tiu kredo baziĝas sur konfuza kun la germana vorto "Fräulein". Sed en la germana, Fräulein estas Frau+lein — "Lein" estas diminutivo, sed Frau, origine, signifas sinjorino. Ekzemple, Frauenkirche ne estas preĝejo rezervita al virinoj, kiel oni povus pensi pro tro supraĵa kono de la germana lingvo, sed preĝejo dediĉata al la plej supera sinjorino, t.e. la virgulino Maria. En esperanto, fraŭlino ne estas frau + lino sed fraul + ino. Nu, fraul ne enhavas en si ĝentilan valoron. La pruvo estas, ke oni ne alvokas fraŭlajn virojn per la vorto "fraŭlo", sed per la vorto "sinjoro".

Ankaŭ "ino" ne havas en si ĝentilan valoron. Konsekvence, la vorto "fraŭlino" logike ne estas ĝentila vorto, sed simpla konstato, ke virino ne havas edzon.

Sciante, ke mi estas "fraŭlino Lépeix", ĉiuj viroj de la staĝo scios, ke ili povas min alparoli ne timante la subitan alvenon de laŭleĝa kunulo mia. Ĉiuj viroj de la staĝo estas informitaj, ke mi estas ankoraŭ kaptebla. Sed kial mi, miaflanke, ne rajtas scii, ĉu la belvizaĝa kavaliro, kiu pormomente sidas sole, estas libera aŭ ne? Pri li mi scias nur, ke li estas "sinjoro", kio tute nenion sciigas al mi. Kial tiu diferenco en nia epoko, kiam oni ĉie parolas pri egaleco de ambaŭ seksoj? Do, se oni volas konservi la vorton "fraŭlino" por la informado de la viraj partoprenantoj, necesas, pro reciprokeco, ke la aliĝilo menciu: sinjoro - sinjorino - fraŭlo - fraŭlino

Jes, sed, en nia jarcento, la moralo evoluas, kaj ne ĉiuj paroj vidas la necesecon prezentiĝi en la urbodomo aŭ ĉe kolego de samideano Degrelle. Konkubeco estas nun agnoskata de la leĝo. Do la aliĝilo devus mencii:

sinjoro - sinjorino - fraŭlo - fraŭlino - konkubo - konkubino

Sed pro la evoluo de la moroj, pli kaj pli da homoj opinias, ke ne estas tragedio, se la kunulino foje tranoktas kun iu alia. Tiu informo povas esti utila por partoprenantoj de semajnfino. Tial la aliĝilo devus mencii:

fraŭlo, fraŭlino, fifela edzo, fidela edzino, nefidela edzo, nefidela edzino, fidela konkubo, nefidela konkubino.

Sed ĝis nun mi traktis nur la kazojn de tiuj, kiuj rilatas kun aliseksanoj. Nuntempe la gejoj estas organizitaj en la esperantista movado. Kial diskriminacii tiun parton de la esperantistaro? Do la aliĝilo devas mencii:

fraŭlo - fraŭlino - fidela edzo - fidela edzino - nefidela edzo - nefidela edzino - fidela konkubo - nefidela konkubo - samseksulo fidela al kunulo - libera samseksulo - samseksulino fidela al kunulino - libera samseksulino

Tiel la partoprenantoj estos korekte informitaj, pri kio eblas aŭ ne dum la staĝo.

Krome ekzistas inter ni kelkaj apartaj kazoj, kiuj ni devus ankaŭ mencii, ekzemple:
 pastro
 monaĥino novica (ankoraŭ ekzistas espereto...)
 monaĥino definitive promesinta
 anĝelo (jam venis unu el Greklando...)

Kompreneble, la ekzakta kategorio de ĉiu devus esti menciita sur la etikedo, kiun ricevas ĉiu alvenanto. Se ĉiuj viroj de la staĝo rajtas scii, ke mi ne havas edzon, tio estas, esti informitaj pri detalo de mia privata vivo, kial mi, miaflanke, ne rajtus scii pri la privata vivo de ĉiuj partoprenantoj?

Mi imagas la kapon de la organizantoj! Kiel eblas redakti aliĝilojn menciante tiujn detalojn sen preni tutan paĝon de "La Informilo"?

Fakte, kion bezonas scii organizanto:

= kiom da litoj mi bezonas

= en kiom-lita ĉambro

= se mi bezonas unu liton en plur-lita ĉambro, ĉu mi estas viro aŭ virino

Tiurilate, edzino, kiu venas al la staĝo sen sia edzo, estas ekzakte en la sama kategorio, kiel fraŭlino: aŭ ŝi tranoktos sole, aŭ ŝi tranoktos kun aliaj virinoj. Kial do ŝi devas mencii, ke ŝi havas edzon, kiu ne venos? Tiu informo neniel utilas al la organizado de la staĝo. sen mencii la faktan, ke eks-edzinoj kaj vidvinoj, kiuj venas sole, eniras la kategorion "sinjorino", kaj ne la kategorion "fraŭlino".

Finfine la metodo plej simpla, kaj samtempe tiu, kiu plej bone respektas la privatan vivon de ĉiu, estas dividi la partoprenantojn nur en du kategoriojn: viroj kaj virinoj, kaj antaŭvidi en la aliĝilo tre precizajn demandojn pri la lit-rezervado.

Ĝis estos respektata tiu logiko, se viro min demandas -kiel foje okazas- "Ĉu vi estas sinjorino aŭ fraŭlino?", mi respondos "Mi estas fraŭla, kaj vi, ĉu vi estas edzo?". Verŝajne li ofendiĝos pri mia maldiskreteco, ne konsciante, ke temas ekzakte pri la sama demando.

Jacqueline Lépeix

RECENZO

"FACILAJ DIALOGOJ por lerni paroli en Esperanto, la universala helpa lingvo por la nuntempa mondo" / "DIALOGUES FACILES pour apprendre à parler espéranto, la langue universelle pour le monde d'aujourd'hui".

Verkis A. LIENHARDT, la aŭtoro de la sukcesa legolibro "AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO" (kies tria eldono aperis lastjare en PEKINO kun traduko al la ĉina lingvo).

"FACILAJ DIALOGOJ" estas du-lingva eldonaĵo en Esperanto kun paralela traduko al la franca lingvo. (Edition bilingue en espéranto et en français). La 56 paĝoj de ĉi-tiu poŝ-formata libreto A5 enhavas du-lingvan prefacon, gramatikan epitomon (précis grammatical), 12 dialogojn pli/malpli humurajn kun 780 simplaj ĉiu-tagaj dialogo-frazoj, demandoj kaj respondoj facile kompreneblaj. Tiu nova lernilo estas do tre utila por lernantoj de nia lingvo, ĉar ĝi vivigas ilian intereson kaj stimulas ilian lernemon. Krome, dank'al la franca teksto, ĝi povas efiki kiel konvinka propagandilo ebliganta demonstri ke Esperanto vere estas lingvo "vivanta".

Prezo de la libreto "FACILAJ DIALOGOJ" (afrankite): 29 FF.

Eldonisto: Ligue Française "Pro UNESCO", 24 avenue de Riedisheim, F-68100 MULHOUSE

Poŝta Konto: n° 16 233 37 C - PARIS

Espereble, baldaŭ aperos en diversaj landoj similaj du-lingvaj eldonoj de la "FACILAJ DIALOGOJ" kun respektivaj nacia-lingvaj tradukoj.

Por lerni bone paroli nian lingvon, la lernantoj/legantoj povas aŭskulti la specialan kvar-voĉan magnetofonan kaseton "LG/n°3" klare aŭdeblan, sur kiu estas registrita la tuta teksto de la libreto. (en la komerco oni trovas hodiaŭ ne tre kostajn kaseto-aŭskultilojn/magnétophones à cassettes/porteblajn aŭ munteblajn en aŭtomobilojn, kiuj perfekte taŭgas por lerni lingvojn kaj ankaŭ por aŭskulti registritajn legaĵojn, ĝui muzikaĵojn, furorajn kanzonojn, k.t.p.).

Prezo de la magnetofona kaseto LG/n°3 (afrankite): 33 FF

Ĝi estas mendebla ĉe S-r° André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, F-68390 BALDERSHEIM

Poŝta Konto: n° 819 34 U - STRASBOURG

G. KIRTZ-BOEGLIN (Francio)

Dum-viva membro de UEA kaj de UFE -

nia vivo en ...

NANCY

La laborjaro rekomenciĝis la 16an de septembro per kunveno, en kiu partoprenis 14 personoj el Nancy kaj ĉirkaŭaĵo, kaj ankaŭ el Toul kaj Dombasle. Krome 6 personoj ne povis ĉeesti sed skribis aŭ telefonis.

Estis decidite krei klubon, kiu fakte ne plu ekzistis en Nancy jam de longe. Okazos do "liberaj" kunvenoj de tiu klubo la 1an vendredon de ĉiu monato, de la 19a ĝis 22a h. Ĉiuj povos alveni kaj foriri dum tiuj 3 horoj laŭ sia deziro kaj disponebleco.

Pri la kursoj: la P. K^o jam funkcias -vidu apartan raporton- kaj nova cirkulero estis bele eldonita de Pol Denis. La 3a-grada kurso okazas la 1an mardon de ĉiu monato je la 18a30. Ses homoj preparas en ĝi la "ateston pri kapableco". La duagrada okazas la 2an kaj 4an mardon je la 18a30. Ambaŭ gvidas Roger DEGRELLE. Kursoj por komencantoj ne funkcias nun, ĉar malgraŭ sufiĉe vigla informado ne montriĝis interesatoj.

Yves Scheffer, kiu provis krei kurson en la Medicina Fakultato lastjare, rezignis por la nuna jaro, ĉar tiuj studentoj pro laboro kaj ekzamenoj ne povas regule liberiĝi vespere. Interesotoj pli facile lernos perkoresponde. Yves provos starigi "studentan" E^o-klubon en Nancy, ĉar 12 studentoj ĉi-tie estas esperantistoj sed ĝenerale ili ne rilatas inter si. Interesatoj sin turnu al Yves SCHEFFER, 96 rue de la Colline, NANCY, tél.: 398 41 98.

LASTMINUTE: Sr^o Denis KURT ricevis permeson de la Prezidanto de la Universitato Nancy II por malfermi kurson en la Beletra Fakultato. Ĝi funkcios jam nun ĉiun mardon de la 18a ĝis la 19a. Ĉirkaŭ 15 studentoj ĉeestis la unuan lecionon de la "Metodo 11".

STRASBOURG

Post la libertempa sezono nia grupo denove regule kunvenas la 2an mardon de 1^a monato. La 2an de oktobro ni vizitis la grupon de OBERKIRCH kaj gustumis la "novan" dolĉan vinon. La 12an de oktobro S-r^o WICK faris interesan lumbild-paroladon pri naturparkoj kaj monumentoj el la mondo kaj pri la okazinta Universala Kongreso de UEA en Antverpeno, kiun ĉeestis gesamideanoj WICK kaj S-in^o GRAMPP.

La 14an de decembro ni festos la Zamenhof-tagon per legado el liaj poemoj kaj mendo de E^o-libroj. Ek de januaro 1983 nia asocia kotizo strasburga altiĝos je 15F.

Ni sendis kondolencajn esprimojn al la japana esperanto-instituto kaj al la familio de Prof. D-r^o EGAMI, kiu forpasis en julio. S-r^o EGAMI, afabla kaj sindonema persono, vizitis niajn kunvenojn dum lia studado je la Universitato de Strasburgo en 1935.

S-in^o MULLER denove organizas kurson por la "3a-aĝo" en la Universitato.

F. ZIPFEL



► **trafa konsilo:** *pagu tiujn viajn kotizojn !!*

Ankaŭ ni... agadas en Munster!

"En nia kolegio (Munster) ni organizis ekspozicion (ekspozici-materialo de la Federacio) pri la esperanta lingvo. Ni alkvociis multe da poŝtkartoj kaj leteroj (el Japanio, Irano, Nov-Zelando, Israelo kaj Pollando) kja prezentis kelkajn gazetojn, por ke la gelernantoj povu vidi, ke oni povas korespondi kun homoj en la tuta mondo.

Por reklami ni uzis "Metodo-n 4", kiun ni disdonis al la ses-dek profesoroj kaj al 180 lernantoj de la 4a klaso, sed 800 gelernantoj vizitis la ekspozicion. Ankaŭ ĵurnalisto venis kaj fotis nin. Kelkaj profesoroj eĉ diris al ni, ke ili lernos la lingvon. Jam kvar el ili lernis Esperanton."

Nadine, Myriam, Corinne

Elementa kurso malfermiĝis kaj gastigas 4 homojn, ĉiuj plenkreskuloj. La grupo partoprenis la unuan Tutmondan Pac-kunsidon de la "Martiraj Urboj" en VERDUNO. Ekspozicio plene efikis kaj disdoniĝis du centoj da inform-folioj. Post interveno en la debato estis decidite enŝovi rezolucion en la finan agadplanon, laŭ kiu E^o estu uzota por faciligi ĉiajn rilatojn inter la koncernitaj urboj.

Surloke la urbo-biblioteko havigis al si oficiale la diskon de Max-Roy Carrouges, "ESPERANTO kaj LIBERECO". Kelkaj klubanoj same aĉetis ĝin pere de normala komerc-firmao. Imi-tinda ekzemplo por ĉiuj membroj de nia Federacio!

Amika kunven-vespero arigis 30 klubanojn kaj simpatiantojn por spekti la intereso-plenan serion da diapozitivaj kaptitaj de S-in^o Dillenschneider okaze de sia vojaĝo al kaj tra Ĉinio, pere de Esperanto. Ni plezure ĵus eksciis pri la diplomiĝo de nia kunlaboranto, S-r^o F.-X. Gilbert, kiu sukcesis la "praktikan ateston" dum la 16a staĝo en NANCY. Menci-indas la nombro da partoprenantoj el Bar-le-Duc al tiu staĝo:.. 8 personoj.

Skipo jam preparas la internacian karnavalon de la 17/18/19ajn de marto 1983 en BAR.

SELESTAT

Intensa reklamado okazis en la liceo de SELESTAT per "Metodo 4" (... la 10 rendevuoj...) Krome nia agema kunlaboranto Sinjoro Guegueniat parolis pri la Internacia Lingvo al 80 gelernantoj. Funkcias nun du kursoj kun sume 46 gelernantoj.

(lastminute: temas pri 90 gelernantoj! Gratulon!!)

E Ĥ O J E L T R I E S T E

Kun granda ĝojo mi partoprenis al la 6a Internacia Junulara festivalo je Pasko en TRIESTE.

Jam tre malproksime de la festivalejo, aŭtovojante inter Milano kaj Venecio, surpriza mi estis, kiam mi ekvidis grandegan esperantan stelon pentritan sur malnova domo. Tio estas bona propagandilo por la aŭtovojistoj. Alvenante en Trieste, ĉar mi ne konis tiun-ĉi ĉarmatan havenurbon, mi min turnis al la stacidomo, kie estis "verda" akceptejo. Finfine mi trovis la kunvenejon en moderna domo "Internacia Instituto de Homaj rajtoj", de kie oni havis belegan panoramon super la urbo.

Ni estis pli ol cent gejunuloj de la diversaj eŭropaj landoj, ĉefe el Italio, Germanio, Belgio kaj eĉ de Brazilio! La etoso estis tre amika kaj agrabla. Sanktan Vendredon estis la oficiala inaŭguro en la ĵurnalejo "Circolo della Stampa". Tie, politikaj, kulturaj reprezentantoj kaj pli ol ducent personoj atendeme aŭskultis -en itala lingvo-... kaj en Esperanto la bonvenon kaj paroladojn pri nia movado.

Dum la tri tagoj de la Festivalo ni faris teatron, konkurson pri E^o-movado, ludojn ("detektiva ludo...") kaj ni kantis kun la Milanano, kantisto Gianfranco MOLLE. Tiun-ĉi internacian kaj amikan etoson mi esperas trovi venontan jaron al suna lando.

Tie estis ankaŭ viglaj gejunuloj de la "kastora" klubo de la urbo Gorizia, kiuj tre ŝatus korespondi kun francaj gejunuloj (ili estas 13/19 jaraĝaj). Jen la adreso de la gvidantino:

Sinjinoro Sera GENOVESE
Via Pitteri, 14
I-34170 GORIZIA Italujo

Mikelo BASSO
(68) Wintzenheim

